# VIII
# Exigências da Solidariedade

As criaturas que hoje se amesendam com o pão da carne serão amanhã as criaturas da vida real, acomodando-se, obrigatoriamente, aos valores do espírito.

Desembaraçadas do coche físico, ainda mesmo quando, temporariamente imobilizadas nas idéias antropocêntricas que lhes alimentavam os dias, acabarão apreendendo o imperativo da própria libertação, abrindo janelas interiores que lhes ventilem os pensamentos.

Se um homem comum da atualidade, ocupando um avião a jato, pode retirar-se da América, descansar na África e conciliar negócios na Europa, no espaço de algumas horas, precisa senhorear várias línguas ou remunerar diferentes intérpretes para movimentar-se com segurança e proveito, imaginemos o homem desencarnado, na complexidade das sensações novas que o tomam de assalto, quando a ruptura da represa sensorial lhe extravasa os sentidos. A sede de comunicação e de solidariedade requeima-lhe o cérebro e comprime-lhe o coração.

É imprescindível falar e ouvir, perceber e compreender, desonerar-se de condicionamentos antigos, quebrar velhas fórmulas, ajustar-se a mais amplas dimensões, expungir o passado e partir de si mesmo.



# VIII
# Postuloj kaj Solidareco

La estuloj, kiuj hodiaŭ sidas ĉe la tablo por manĝi la panon de la karno, morgaŭ estos la estuloj de la reala vivo, nepre adaptiĝantaj al la spiritaj valoroj.

Liberiĝintaj de la fizika ĉaro, eĉ kiam ili estas ŝtonigitaj ĉe la antropocentraj ideoj, nutrantaj iliajn tagojn, ili neeviteble asimilos la imperativojn de sia propra liberiĝo, malfermante internajn fenestrojn, kiuj renovigos iliajn pensojn.

Se nuntempa ordinara homo, kiu, uzante jetaviadilon, povas forflugi el Ameriko, ripozi en Afriko, kaj pritrakti negocojn en Eŭropo, en kelkhora tempospaco, bezonas posedi diversajn lingvojn aŭ pagi al pluraj interpretistoj, por ke li povu sin movi sekure kaj profite, ni prezentu al ni la elkarniĝintan homon subite atakitan de la kompleksaj, novaj sensacoj, kiam la rompiĝo de lia sensoria kluzo troplenigas al li la sentumojn. La soifo de komunikiĝo kaj solidareco bruligas lian cerbon kaj subpremas lian koron.

Estas nepre necese paroli kaj aŭdi, percepti kaj kompreni, malŝarĝiĝi je malnovaj kondiĉoj, rompi malnovajn formulojn, alĝustiĝi al pli vastaj dimensioj, neniigi la pasintecon kaj rekomenciĝi de si mem.